26-a Internacia Festivalo

27 dec 2009 – 3 jan 2010

Nördlingen

(kun plilongigaj eblecoj ĝis 4 jan 2010)

Kadra temo: Fabeloj, fabloj kaj legendoj

- konciza programo
  (sekvantaj paĝoj)
- detala programo
  (paĝoj 26 - 32)
- salonoj

[pron: Nørdlingn]	Nördlingen	teretaĝo	*dekstre de Knajpo, malantaŭe*
[pron: Ni:rnberg]	Nürnberg	teretaĝo	*dekstre de Knajpo, apud saŭno*
[pron: Dinkelsbi:l]	Dinkelsbühl	teretaĝo	*apud manĝejo (= manĝejo II)*
	Bavario	unua etaĝo	*> lifto > poste fine de koridoro*

matena programo:	10.00 h - 11.30 h
tagmanĝo:	12.00 h - 13.00 h
posttagmeza sesio I:	13.30 h - 15.00 h
kafopaŭzo:	15.00 h - 16.30 h
posttagmeza sesio II:	16.30 h - 18.00 h
vespermanĝo:	18.30 h - 19.30 h
vespera programo:	20.00 h - 21.30 h

INTERNACIA FESTIVALO

www.internacia-festivalo.de ... jarfine al IF

(superrigardo) — KONCIZA

Horo	dim 27 dec	lun 28 dec	mar 29 dec	mer 30 dec
07.30 - 09.30	(matenm. helpantoj)	matenmanĝo	matenmanĝo	matenmanĝo
10.00 - 11.30	(Preparoj)	• fabelo Andersen *(salono Nördlingen)* • Ĵurnalismo *(salono Nürnberg)* • MONATO *(salono Dinkelsbühl)* • *Desegno*-kurso *(salono Bavario)*	• IVU - matematikoj II *(salono Nördlingen)* • instruado Eo *(salono Nürnberg)* • Hans Held *(salono Dinkelsbühl)* • Promeno *(Schaeffer)* Nördlingen	9.30 h ◄ • Tuttaga ekskurso al Nürnberg • Ne-ekskursantoj: urbo / naĝejo
12.00 - 13.00	(tagmanĝo helpantoj)	tagmanĝo	tagmanĝo	tagmanĝo
13.30 - 15.00	Alveno	• fabelo fratoj Grimm *(salono Nördlingen)* • IVU - matematikoj I *(salono Nürnberg)* • EDE-partio *(salono Dinkelsbühl)* • vizito bierfarejo '*Ankerbräu*'	• Nova gripo *(salono Nördlingen)* • IVU - Nulo-historio I *(salono Nürnberg)* • kantoj en Eo *(salono Dinkelsbühl)* • Muzeo 'Rieskrater'	• Tuttaga ekskurso al Nürnberg • Ne-ekskursantoj: urbo / naĝejo
15.00 - 16.30	(kafopaŭzo)	kafopaŭzo	kafopaŭzo	kafopaŭzo
16.30 - 18.00	Alveno	• Rusa fabelo *(salono Nördlingen)* • Revuo Esperanto *(salono Nürnberg)* • Zamenhof hodiaŭ *(salono Dinkelsbühl)* • Paroliga kurso I *(salono Bavario)*	• Afganio *(salono Nördlingen)* • Sonlibroj Schwartz *(salono Nürnberg)* • Aŭtoro Karpunina *(salono Dinkelsbühl)* • E-civito *(salono Bavario)*	• Tuttaga ekskurso al Nürnberg • Ne-ekskursantoj: urbo / naĝejo
18.30 - 19.30	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo
20.00 - 21.30	**ĉ**. 19.45 h: • Interkona Vespero kun Mikaelo Bronŝtejn (Rusio) *(manĝejoj)*	• Dagestana Vespero kun Aĥman kaj 2 x Elena *(salono Nördlingen)*	• Rusa Vespero kaj koncerto kun Vera, Inga kaj Mikaelo *(salono Nördlingen)*	• Zamenhof - Vespero ni festu, kantu kaj dancu ... *(salono Nördlingen)*
21.30 - ...	Knajpo	Knajpo	Knajpo	Knajpo

PROGRAMO — (superrigardo)

ĵaŭ 31 dec	**ven 1 jan**	**sab 2 jan**	**dim 3 jan**	**Horo**
matenmanĝo		matenmanĝo	matenmanĝo	(matenm. plilong.)
• Juda Pollando *(salono Nördlingen)* • IVU - Nulo-historio II *(salono Nürnberg)* • Mantro *(salono Dinkelsbühl)* • Unu Mondo - partio *(salono Bavario)*	10 h **ĝ**is 13 h: • Novjara brunĉo - unue kafo, ekde 11.00 h varma manĝo	• Norda Koreio *(salono Nördlingen)* • IVU - Ekologio *(salono Nürnberg)* • Anekdotoj *(salono Dinkelsbühl)* • Promeno *(Bormann)* Nördlingen	• Adiaŭo Komenco de la plilongiga tago: • teo-gustumado *(salono Nürnberg)*	9.30 - 11.00 Plilongigo: • Adiaŭo
tagmanĝo		tagmanĝo	tagmanĝo	12.00 - 13.00
• IVU - astroj I *(salono Nördlingen)* • Prokofiev *(salono Nürnberg)* • Paroliga kurso II *(salono Bavario)*	• Novjara promeno: Urba murego • Saŭno-oferto en la domo	• Ondo sur ondon *(salono Nördlingen)* • Latvaj fabeloj *(salono Nürnberg)* • Aŭtoro Bronŝtejn *(salono Dinkelsbühl)* • Vizito de la turo 'Daniel'	Plilongigo: • Ekskurso al Dinkelsbühl - per buso 13.30 h	13.30 - 15.00
kafopaŭzo	kafopaŭzo	kafopaŭzo		15.00 - 16.30
• IF en retrospektivo *(salono Nördlingen)* • Iano ĉe la Piano *(salono Nürnberg)*	• IVU - astroj II *(salono Nördlingen)* • Enpaki tukon *(salono Nürnberg)* • Diservo en Eo *(salono Dinkelsbühl)*	• Dagestana fabelo *(salono Nördlingen)* • Ĝemelaj urboj *(salono Nürnberg)* • Katano *(salono Dinkelsbühl)* • Obskura arbaro *(salono Bavario)*	Plilongigo: • ekskurso al Dinkelsbühl *(kafopaŭzo)*	16.30 - 18.00
	vespermanĝo	vespermanĝo	vespermanĝo	18.30 - 19.30
19.30 h: • Silvestra bufedo **ĉ**. 21.30 h: • Silvestra balo 00.00 h: • Novjaraj kisoj	• Israela Vespero kun Esti kaj Amri *(salono Nördlingen)*	• Internacia Vespero kun kontribuoj el la publiko *(salono Nördlingen)*	Plilongigo: • Distra Vespero *(salono Nürnberg)*	20.00 – 21.30
balo	Knajpo	Knajpo		21.30 - ...

— DETALA PROGRAMO —

DIM 27 DEC 2009

18.30 h Interkona vesperman**ĝ**o - varma kaj malvarma (bufeda) manĝo
(teretaĝo, manĝejoj) – *pro la sekva programo bv. resti en la man**ĝ**ejo!*
19.45 h Interkona vespero - kun Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)
(teretaĝo, manĝejoj)
21.30 h Nia populara IF-gastejo Knajpo atendas vian unuan viziton ...
(teretaĝe, enira halo)

♦ ♦Niaj (regulaj) gimnastikaj resp. danc-ofertoj ♦ ♦

☺ antaŭ la matenmanĝo, 8.00 h - 8.45 h, en salono Nürnberg, teretaĝe:
ĉiutage: "Tai-chi-chuan", gimnastiko laŭ malnova ĉina tradicio; gvidas Barbara Poterucha, BE

☺ antaŭ la vespermanĝo, 18.00 h - 18.45 h, en salono Nürnberg, teretaĝe:
28 kaj 29 dec 2009: kursetoj "linia danco"; dancoj por unuopuloj kaj paroj ...
gvidas Vida Kulikauskiené (Litovio), laŭdezire ankaŭ en sekvaj tagoj ► bv. interkonsenti ...

♦ ♦Nia oferto post la vespera programo ♦ ♦

☺ 28 dec 2008: flamenka dancvespero, en salono Nürnberg, teretaĝe
gvidas Liba Gabalda (Francio), laŭdezire ankaŭ en sekvaj tagoj ► bv. interkonsenti ...

LUN 28 DEC 2009

10.00 h Prelego de Stano Marček (Slovakio)
Fabeloj de Andersen ► *vd. resumon, paĝo 13*
(teretaĝe, salono Nördlingen)
10.00 h Prelego de Alfred Schubert (Germanio)
Ĵurnalismo ► *vd. resumon, paĝo 17*
(teretaĝe, salono Nürnberg)
10.00 h Prelego de Paul Peeraerts (Belgio)
MONATO – 30-jara**ĝ**a ► *vd. resumon, paĝo 16*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)
10.00 h Desegno-kurso kun Manfred Pfister (Germanio)
(unua etaĝo, salono Bavario)
13.30 h Prelego de Stano Marček (Slovakio)
Fabeloj de la fratoj Grimm ► *vd. resumon, paĝo 13*
(teretaĝe, salono Nördlingen)
13.30 h IVU-prelego de Hannes Larsson (Francio) – sesio I
Distraj matematikoj – antikvaj fabeloj ► *vd. resumon, paĝo 20*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

— DETALA PROGRAMO —

LUN 28 DEC 2009

13.30 h prelego de Alfred Schubert kaj d-ro Eugen Macko (Germanio)
EDE - **ĉ**u Esperanto-partio? ► *vd. resumon, paĝo 18*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

13.30 h vizito al la loka bierfarejo – *laŭbezone eblas ankaŭ plia vizito je 13.45 h*
Ankerbräu Nördlingen (tradukos je 13.30 h Harald Schicke; laŭbezone je 13.45 h Brian Moon)
(renkontiĝo: ĉefa elirejo, maks. partopren-nombro po vizito 25 pers., kostoj: 1 € popers.)

15.00 h Kafopa**ŭ**zo en nia Knajpo
(teretaĝe, enira halo)

16.30 h Prelego de Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)
Rusa fabelo: Ivan-la-Stultulo ► *vd. resumon, paĝo 12*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

16.30 h Prelego de Stano Marček (Slovakio)
La revuo Esperanto ► *vd. resumon, paĝo 16*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

16.30 h Prelego de Ian Fantom (Anglio)
Zamenhof hodia**ŭ** ► *vd. resumon, paĝo 17*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

16.30 h Paroliga kurso kun Aĥman Junusov (Rusio) - sesio I
(unua etaĝo, salono Bavario)

20.00 h Dagestana Vespero
- kun Aĥman Junusov, Elena Smirnova kaj Elena Sepikhanova (Rusio)
(teretaĝe, salono Nördlingen)

21.30 h Nia Knajpo atendas vin ...
(teretaĝe, enira halo)

MAR 29 DEC 2009

10.00 h IVU-prelego de Hannes Larsson (Francio) – sesio II
Distraj matematikoj - rakontoj kaj anekdotoj ► *vd. resumon, paĝo 20*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

10.00 h Prelego de Stano Marček (Slovakio)
Rektmetoda instrado de Esperanto ► *vd. resumon, paĝo 16*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

10.00 h Prelego de Alfred Schuber (Germanio)
Hans Held ► *vd. resumon, paĝo 14*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

10.00 h Promeno tra Nördlingen, *gvidas Karl-Heinz Schaeffer (Germanio*
(renkontiĝo: ĉefa enirejo, simila promeno kun Thomas Bormann je 2 jan 2010, 10.00 h)

— DETALA PROGRAMO —

MAR 29 DEC 2009

13.30 h Prelego de Harald Schicke (Germanio)
La nova gripo ('porka gripo') ► *vd. resumon, paĝo 15*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

13.30 h IVU-prelego de Yashovardhan Singh (Germanio/Hindio) - sesio I
De cifero al nombro - historio de la NULO ► *vd. resumon, paĝo 20*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

13.30 h Prelego (kun instruo) de Stano Marček (Slovakio)
Ĉu instrui kantojn en niaj Esperanto-kursoj ► *vd. resumon, paĝo 18*
(teretaĝe, salono salono Dinkelsbühl)

13.30 h Vizito al Rieskrater-Muzeo
- kun informoj pri la ekesto de la kratera regiono **ĉ**irka**ŭ** Nördlingen
(renkontiĝo: ĉefa elirejo; gvidas Brian Moon, kostoj 3 € popers., en grupo kun pli ol 20 pers.)

15.00 h Kafopa**ŭ**zo en nia Knajpo
(teretaĝe, enira halo)

16.30 h Prelego de Ulrich Brandenburg (Belgio/Germanio)
Lecionoj el Afganio ► *vd. resumon, paĝo 14*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

16.30 h Prelego de Stano Marček (Slovakio)
Sonlibroj de Raymond Schwartz ► *vd. resumon, paĝo 18*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

16.30 h A**ŭ**tora horo kun Lena Karpunina (Rusio) ► *vd. resumon, paĝo 17*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

16.30 h Prelego de Dieter Rooke (Svislando)
E-civito ► *vd. resumon, paĝo 17*
(unua etaĝo, salono Bavario)

20.00 h Rusa Vespero - kun kantoj, dancoj, vodko kaj oksikokoj ...
- kun Vera Vlasova, Inga Krejson kaj Mikaelo Bron**ŝ**tejn
(teretaĝe, salono Nördlingen)

21.30 h Nia Knajpo atendas vin ...
(teretaĝe, enira halo)

La domo disponas pri bonekipita sa**ŭ**no – ni povos utiligi **ĝ**in senkoste!
Ni ofertas al vi jenajn sa**ŭ**no-horojn:
28 kaj 30 dec: 21.30 - 23.30 h ▪ 1 jan: 13.30 - 15.30 h ▪ 2 jan: 21.30 - 23.30 h
Ni antaŭvidas saŭnon por virinoj kaj viroj kune, sed laŭdezire eblas mendi apartigitan saŭno-tempon.
En nia IF-oficejo vi povos ricevi saŭno-rekomendojn ("10 saŭno-reguloj"); vi antaŭvidu por vizito du grandajn mantukojn (unu por la komenca kaj fina sekigoj, dua por sidi aŭ kuŝi sur ĝi en la saŭnejo).

— DETALA PROGRAMO —

MER 30 DEC 2009

09.30 h Tuttaga aŭtobusa ekskurso al Nürnberg *(bv. esti akurataj!)*

11.00 h promenoj en Nürnberg, ĉiĉeronas Keiko Zeilinger kaj Sabine Hauge
13.00 h tagmanĝo en restoracio 'Bratwurst-Röslein' (diversaj frankoniaj specialaĵoj)
15.00 h daŭrigo de promenoj resp. ebleco de butikumado
17.00 h reveturo al Nördlingen
18.30 h reveno, vespermanĝo en la IF-ejo

Ne-ekskursantoj: maten- kaj tagmanĝoj laŭ la kutima tempo en la manĝejo
viaj hodiaŭaj eblecoj: urbaj promenoj, naĝeja vizito kaj butikumado

20.00 h Mikaelo, Inga kaj aliaj prezentos al vi
Zamenhofan Vesperon (kun filmoj, kantoj, dancoj kaj ...)
(teretaĝe, salono Nördlingen)

21.30 h Nia Knajpo atendas vin ...
(teretaĝe, enira halo)

ĴAŬ 31 DEC 2009

10.00 h Prelego de d-ro Amri Wandel (Israelo)
Bildoj de juda Pollando: tio kio estis kaj (ne) restis ► *vd. resumon, paĝo 16*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

10.00 h IVU-prelego de Yashovardhan Singh (Germanio/Hindio) - sesio II
De cifero al nombro - historio de la NULO ► *vd. resumon, paĝo 20*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

10.00 h Mantro - meditado kun Kees Ruig (Nederlando) ► *vd. resumon, paĝo 17*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

10.00 h Prelego de Alfred Schubert (Germanio)
Nova partio: Unu Mondo ► *vd. resumon, paĝo 18*
(unua etaĝo, salono Bavario)

13.30 h IVU-prelego de d-ro Amri Wandel (Israelo) - sesio I
Fabeloj de sezonoj kaj astroj ► *vd. resumon, paĝo 19*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

13.30 h Prezento de Wolfgang Loose (Germanio)
Sergej Prokofiev: La ŝtona floro ► *vd. resumon, paĝo 14*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

13.30 h Paroliga kurso kun Aĥman Junusov (Rusio) - sesio II
(unua etaĝo, salono Bavario; laŭdezira daŭrigo: 1 jan je 16.30 h)

15.00 h Kafopaŭzo en nia Knajpo
(teretaĝe, enira halo)

— DETALA PROGRAMO —

ĴAŬ 31 DEC 2009

16.30 h Lumbildprelego de Brian Moon (Luksemburgio)
IF en retrospektivo *(bildoj el la pasintjaraj IF-oj)*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

16.30 h Recitalo de Ian Fantom (Anglio) ► *vd. resumon, paĝo 16*
Iano **ĉ**e la Piano *(kelkaj popularaj komponaĵoj de Felix Mendelssohn)*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

16.30 h Balpreparoj - kiu volas helpi?
volontuloj venu al la manĝejo

19.30 h **TRADICIA SILVESTRA BUFEDO**
en la manĝejoj I + II
Knajpo: translokiĝo al manĝejo; ne eblas rezervi lokojn antaŭ 19.30 h pro la preparlaboroj
Bufeda ordo: 1: fotoeblecoj – 2: sidi**ĝ**o – 3: salutvortoj – 4: man**ĝ**o

21.30 h **SILVESTRA BALO**
post la bufeda manĝo ĝi inaŭguriĝas per mazurko (gvidas Liba Gabalda, Francio)

00.00 h **Ni bonvenigas la novan jaron ...**
ankaŭ dum aliaj horzonoj ... rusa, litova, latva, israela, angla, japana, usona ...

VEN 1 JAN 2010

Ni deziras al vi ĉiuj feliĉan Novjaron, sanon kaj prosperon !

10.00 h Novjara brun**ĉ**o - kombinita maten- kaj tagmanĝo (varma kaj malvarma)
seninterrompe **ĝ**is 13.00 h / unue kafo, ekde **ĉ**. 11.00 h varmaj man**ĝ**oj
(manĝejoj, venu laŭplaĉe)

13.30 h Novjara promeno
Rondiro sur la urba murego *(ĉ. 90 min, depende de via promenkapablo)*
(renkontiĝo: ĉefa elirejo; gvidas Floreal Gabalda, Francio)

15.00 h Kafopa**ŭ**zo en nia Knajpo
(teretaĝe, enira halo)

16.30 h IVU-prelego de d-ro Amri Wandel (Israelo) - sesio II
Fabeloj de sezonoj kaj astroj ► *vd. resumon, paĝo 19*
(teretaĝe, salono Nördlingen)

16.30 h Prezento kaj prelego de Masumi kaj Tacuo Huĝimoto (Japanio)
Enpaki per tuko - interrilato de objektoj kaj koro ► *vd. resumon, paĝo 15*
(teretaĝe, salono Nürnberg)

16.30 h Diservo en Esperanto - celebras pastro Bernhard Eichkorn (Germanio)
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

— DETALA PROGRAMO —

VEN 1 JAN 2010

20.00 h Israela Vespero kun Esti Sebban kaj Amri Wandel
(teretaĝe, salono Nördlingen)
21.30 h Nia Knajpo atendas vin ...
(teretaĝe, enira halo)

SAB 2 JAN 2010

10.00 h Prelego de Harald Schicke (Germanio)
Raporto pri Norda Koreio ► *vd. resumon, paĝo 15*
(teretaĝe, salono Nördlingen)
10.00 h IVU - prelego de d-ro Eugen Macko (Germanio)
Ekologio de kulturoj kaj la hipernacia lingvo ► *vd. resumon, paĝo 21*
(teretaĝe, salono Nürnberg)
10.00 h Invitas vin aŭskulti (kaj prezenti mem) anekdotojn el diversaj landoj kaj popoloj:
Lena Karpunina: anekdotoj kaj **ŝ**ercoj de diversaj latitudoj
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)
10.00 h Promeno tra Nördlingen, ĉiĉeronas *Thomas Bormann (Germanio)*
(renkontiĝo: ĉefa enirejo)
13.30 h Prelego de Ugo de Riu kaj Annarosa Andrei (Italio)
Ondo sur ondon - malrapide per kajako **ĉ**irkaŭ insuloj ► *vd. resumon, paĝo 15*
(teretaĝe, salono Nördlingen)
13.30 h Prelego de Biruta Rozenfelde (Latvio)
Latvaj popolaj fabeloj - kaj fabeloj de latvaj verkistoj ► *vd. resumon, paĝo 12*
(teretaĝe, salono Nürnberg)
13.30 h A**ŭ**tora horo kun Mikaelo Bronŝtejn (Rusio) ► *vd. resumon, paĝo 17*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)
13.30 h Vizitu kun Floreal la 93 m altan pre**ĝ**ejan turon 'Daniel'
(renkontiĝo: ĉefa enirejo, gvidas Floreal Gabalda, Francio; kostoj ĉ. 3 € popers.)
15.00 h Kafopa**ŭ**zo en nia Knajpo
(teretaĝe, enira halo)
16.30 h Prelego de Aĥman Junusov kaj Elena Smirnova (Rusio)
Dagestana fabelo ► *vd. resumon, paĝo 12*
(teretaĝe, salono Nördlingen)
16.30 h Diskutrondo kun Annarosa Andrei kaj Ugo de Riu (Italio) ► *vd. resumon, paĝo 18*
Ĝemelaj urboj kaj Esperanto
(teretaĝe, salono Nürnberg)

■ Observado de nokta **ĉ**ielo kaj kosmo (d-ro Wandel): *vd. niajn anoncojn!*

— DETALA PROGRAMO —

SAB 2 JAN 2010

16.30 h Prelego de Rob Keetlaer (Nederlando)
La koloniantoj de Katano >> *resumon vi trovos surloke ĉe »IF-informoj«*
(teretaĝe, salono Dinkelsbühl)

16.30 h Rakontas al vi propran fabelon: Kees Ruig (Nederlando)
Bestoj en la obskura arbaro (3-foje 20 min, ĉiam kun paŭzeto)
(unua etaĝo, salono Bavario)

20.00 h Internacia vespero – kun viaj kontribuoj
aktivul(in)oj bv. anonciĝi dumsemajne ĉe Mikaelo Bronŝtejn aŭ Harald Schicke
(teretaĝe, salono Nördlingen)

21.30 h Lasta **ŝ**anco por viziti kaj **ĝ**ui nian Knajpon
(teretaĝe, enira halo)

DIM 3 JAN 2010

07.30 h Matenman**ĝ**o *(ĝis 09.30 h; kiel kutime)*

- ☺ Se hodia**ŭ** vi hejmenveturas kaj ne partoprenas la plilongigan tagon:
- ☺ Plenigu la enketilon kaj notu viajn impresojn pri Nördlingen!
- ☺ laŭdezire: tagman**ĝ**o 8.00 €; lun**ĉ**pakaĵo 5 € (bv. informi jam tagon antaŭe)
- ☺ ne forgesu redoni vian **ĉ**ambro-**ŝ**losilon!

Bonan hejmenvojaĝon!
Ĝis la revido!

► Plilongigo: 3-a de januaro **ĝ**is 4-a de januaro 2010 *(post matenman**ĝ**o)*

10.00 h Seminarieto de Jeong-ok Song kaj Harald Schicke (Germanio)
Gustumigo de teoj el Koreio kun prezento de iliaj efikoj
(teretaĝe, salono Nürnberg)

13.30 h Komuna vizito per aŭtobuso
Dinkelsbühl *(la mezepoka fratino; kun promenoj kaj kafopaŭzo)* ► *vd. informon, paĝo 37*
(renkontiĝo: parkejo; gvidas Brian Moon; aŭtobusa kosto inkluzivita; kafopaŭzo individue pagenda)

20.00 h Distra Vespero
(teretaĝe, salono Nürnberg)

Atentigu viajn geamikojn pri la jarfina IF - vi kaj la gastoj ricevas rabatokuponon

nia kâdra temo:

Fabeloj

Fabeloj, fabloj kaj legendoj

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

» Rusa fabelo: Ivan-la-Stultulo «

"Vivis iam maljunaj geedzoj kaj havis ili tri filojn – du estis saĝaj, sed la tria – Ivaĉjo-Stultuleto". De tiu frazo ekas amaso da rusaj misteraj fabeloj. La protagonisto, Ivaĉjo-Stultuleto aŭ Ivan-la-Stultulo personigas specialan fabelan strategion, bazitan ne sur ordinaraj postuloj de la praktika racio, sed sur serĉado de originalaj propraj solvoj por ĉiu problemo. La solvoj ofte kontraŭas normalan sencon, sed finkalkule alportas pozitivan rezulton. Do ĉiam, dank' al siaj "stultaj" agoj, Ivan, mokata, nekomprenata sentaŭgulo atingas kompletan sukceson en la vivo, inkluzive nepran edziĝon al filino de la caro... En tiun eventoriĉan, aventurecan mondon vin gvidos Mikaelo, komprenigante la esencon de la plej ŝatata fabela bonŝanculo Ivan per ridindaj historietoj kaj animaciaj filmoj.

Abduraĥman Junusov (Dagestano/Rusio)

» Dagestana fabelo «

Kiel ĉiuj fabeloj en la mondo, ĝi rakontas pri la alia mondo - kun sorĉaĵoj, kun bataloj inter bono kaj malbono, la mondo, en kiu la bestoj estas similaj al homoj, kaj la homoj kvazaŭ vidas magiajn sonĝojn, pri kiuj rakontas al ni ... Estas tamen diferenco inter la konataj eŭropaj fabeloj de Fratoj Grimm, Andersen, Pierrot - kaj orientaj fabeloj, inter kiuj la plej famaj estas "1000 kaj unu nokto". Dagestanaj fabeloj ofte estas similaj al la aliaj fabeloj de nia vasta mondo, sed havas ankaŭ proprajn trajtojn. Kiajn? Pri tio rakontos Aĥman kaj la dagestana teamo. Krome, oni montros desegnitan filmon el unu de la dagestanaj fabeloj.

Aĥman estas ĵurnalisto el Mahaĉkala, ĉefurbo de la kaŭkaza respubliko Dagestano.

Biruta Rozenfelde (Latvio)

» Latvaj popolaj fabeloj kaj fabeloj de latvaj verkistoj «

Kolekto kaj eldono de popolaj fabeloj en la 19-a kaj 20-a jarcentoj. Ĉi-jare ni en Latvio solenis 150-jaran jubileon de Anss Lerhis Puŝkaitis (1859-1902) - "patro de latvaj fabeloj", kiu kolektis kaj eldonis 7 volumojn en 4561 paĝoj de "Latvaj popolaj fabeloj". Profesoro Peteris Ŝmits (1869-1938) sistemigis kaj eldonis (1920-1938) 15 volumojn de "Latvaj fabeloj kaj legendoj". En Latvio plej ŝatatajn fabelojn verkis Karlis Skalbe, Anna Sakse, Imants Ziedonis kaj aliaj. La temaro de fabeloj estas tre diversa. Prelegos kaj rakontos kelkajn fabelojn Biruta Rozenfelde, Gundega van Raden kaj Mara Timermane.

Gonzalo Bermudez (Kolombio)

» La porinfanaj fabloj de kolombia poeto Rafael' Pombo «

Pombo vivis inter 1833 kaj 1912. Li diplomiĝis kiel matematikisto kaj inĝeniero, sed neniam perlaboris profesie tiujn kampojn. Li donis al si mem la titolon poeto, per la jenaj vortoj: "Mi estas poeto, ĉar mi scias fari nenion ... ol skribi versojn". Kvankam reprezentanto de la Romantikismo, li estas multe pli konata pro sia porinfana literaturo. La prelego estos strukturita en tri partoj: La unua pritraktos elementojn de lia vivo kaj verko. La dua estos komparo de Pombo kun aliaj kolombiaj verkistoj de porinfana literaturo, inter ili, Tomaso Karaskija *(Tomás Carrasquilla)* kaj Hajro Anibal Ninjo *(Jairo Aníbal Niño)*. La tria konsistos el detala legado de kelkaj el liaj plej popularaj infanaj fablopoemoj, kun aktorado pri lia plej fama fablo, "La Promenema Ranideto".

Gonzalo estas magistro, teknologo, medicin-interpretisto (hispana-angla) kaj produktanto de aŭdlibroj por blinduloj.

Stano Marček (Slovakio)

» Enkonduko al la du sekvaj prelegoj: aŭskulti fabelojn «

Kiu el ni (niaj infanoj, genepoj) ne ŝatis - kaj eble plu ŝatas - aŭskulti fabelojn? La homan voĉon oni povas registri, aldoni muzikon aŭ kantojn, kaj eldoni sur kompaktdisko. La diskon oni povas aŭskulti antaŭ ol (agrable) ekdormi, dum hejmaj laboroj, en aŭtomobilo... Emfazinda estas la pedagogia valoro de tiu aŭskultado: aŭskulti kaj kompreni parolatan tekston, lerni novajn vortojn, alproprigi al si belajn kaj modelajn vortturnojn en agrabla mondo de fabeloj. Voĉlegitaj fabeloj ĝis antaŭ ne longe mankis en nia merkato kun KD-oj. Stano decidis forigi tiun mankon kaj rakontos al vi pri la projekto.

Stano Marček (Slovakio)

I: » Fabeloj de Andersen «

Hans Christian ANDERSEN (1805 - 1875) estis dana verkisto, kiu famiĝis ĉefe pro la verkado de fabeloj. Tiuj estas tradukitaj al pli ol 100 lingvoj kaj influis teatraĵojn, filmojn, baletojn kaj aliajn artaĵojn. La fabelojn, kiuj aperis en kvar volumoj, tradukis al Esperanto L.L. Zamenhof. Ĝis nun aperis 16 KD-oj kun voĉlegitaj fabeloj de Andersen - do la fabeloj de la unuaj du volumoj. La diskoj estas aĉeteblaj unuope, aŭ po 8 en du plastaj kovriloj (1-a kaj la 2-a volumoj). Stano jam preparas kaj eldonos ankaŭ la volumojn 3 kaj 4.

Stano Marček (Slovakio)

II: » Fabeloj de la fratoj Grimm «

La fratoj Jakob kaj Wilhelm Grimm estis filoj de juristo kaj ankaŭ mem studis juron. Ili ambaŭ laboris kiel bibliotekistoj kaj profesoriĝis en la Universitato de Göttingen. Kvankam la fratoj multon entreprenis kune, ili ankaŭ havis apartajn laborkampojn. Jakob agadis kiel sciencisto, Wilhelm faris la ĉefan laboron en la kolektado kaj kompilado de fabeloj. Ilia plej ampleksa komuna verko estis la Germana Vortaro (Das deutsche Wörterbuch, 1854-1862), de kiu ili faris la volumojn de A ĝis F. En Eo aperis 'Elektitaj fabeloj de fratoj Grimm' (1906), kiujn tradukis el la germana Kabe (Kazimierz Bein, 1872 - 1959). La libro, voĉlegita de Stano, aperis sur 8 KD-oj, aĉeteblaj unuope aŭ en komuna plasta kovrilo.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Wolfgang Loose (Germanio)

» Sergej Prokofiev: La ŝtona floro «

Ensemblo de la Bolŝoj-Teatro en Moskvo prezentas la baleton, kiu baziĝas sur urala fabelo, bedaŭrinde nur sur ekrano. Sed la geaktoroj tiel esprimpove dancas, ke ne multaj klarigaj vortoj estas bezonataj. Wolfgang donas mallongajn enkondukojn al la tri aktoj.

Alfred Schubert (Germanio)

» Hans Held «

Hans Held estis eltrovisto kaj desegnisto. En la 1920aj jaroj li kunkonstruis raketan motoron, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas produktata. Li ankaŭ eltrovis la "Mecki", kiu en la 60aj jaroj varbis por la radiogazeto "Hör zu". En lia vivo miksiĝis realo kaj fantasio, en liaj bildrakontoj bestoj kunagis kun Marsanoj kaj fantaziaj estaĵoj. Li desegnis filmojn kaj produktis filmojn, en kiuj realaj aktoroj agis en nerealaj situacioj. Plej konata estas filmo, en kiu "Baron Münchhausen" rajdas sur kanona kuglo. Jam en la 1950aj jaroj li priskribis la surluniĝon. Li neniam havis monon kaj tamen posedis luksajn aŭtomobilojn kaj aviadilojn. Li havis kontakton kun kunlaborantoj de NASA. Kaj tiu homo, kiu ne multe parolis pri sia laboro, havis la ideon produkti grandegan filmon ...

niaj kromaj prelegoj kaj kontribuoj

Ulrich Brandenburg (Belgio/Germanio)

» Lecionoj el Afganio «

Antaŭ ok jaroj - post la terorismaj atakoj kontraŭ celoj en Usono la 11-an de septembro 2001 - armeoj de Usono kaj aliancanoj intervenis en Afganio kontraŭ la reĝimo de Taliban, kiu estis protektinta la teroristojn. Bazo por tiu interveno estis rezolucio de la sekureca konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, kiu atestis al Usono la rajton de sindefendo. Surbaze de alia rezolucio UN kunvenigis reprezentantojn de ĉiuj frakcioj en Afganio por rekonstrui funkciantan ŝtaton kun iom da internacia subteno, i.a. malgranda nombro de soldatoj el okcidentaj landoj en la ĉefurbo Kabul kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Hodiaŭ en la lando troviĝas pli ol 100.000 eksterlandaj soldatoj, miloj da policistoj, konsilantoj kaj evolu-helpantoj. La afgana armeo nombras ĉ. 90.000, la polico ĉ. 70.000. Partoj de la lando estas stabilaj, en aliaj partoj batalas afgana armeo kaj eksterlandanoj kontraŭ reaktiviĝinta Taliban-movado, kies bazoj nun troviĝas en najbara Pakistano. En iuj regionoj funkcias preskaŭ normala ekonomio, en aliaj prosperas nur la kreskigo de papavo kaj la produktado de drogoj. Milionoj da infanoj denove vizitas lernejojn - preskaŭ duono inter ili knabinoj. Sed tamen multaj afganoj dubas pri la sukceso de la ĝisnuna politiko. Ankaŭ en okcidento kreskas duboj, ĉu eblas daŭrigi kiel ĝis nun - kaj pli ĝenerale duboj, ĉu entute povas sukcesi stabiligo kaj rekonstruado. La venonta konferenco pri Afganio en Londono (28 jan) klare signalu transdonon de respondeco al la afganoj mem. Sed al kiuj?

Ulrich reprezentas Germanion ĉe NATO kaj en la pasintaj jaroj plurfoje vizitis diversajn partojn de Afganio.

Harald Schicke (Germanio)

» Raporto pri Norda Koreio «

Dum marto 2009 Harald vizitis Nordan Koreion, kien li estis invitita kiel fakulo pri ginsengo. Post la dua mondmilito ekestis en Koreio du ŝtatoj, kiuj post 66 jaroj ankoraŭ vivas en milita stato.La komunista respubliko en la nordo de la orientazia duoninsulo estas je kvinono pli granda ol la suda parto, sed estas malpli dense loĝata. Kiel eniri tiun landon, kiu estas plejparte malpermesata al sudkoreoj kaj malfacile alirebla al eksterlandanoj entute? Harald informos pri siaj spertoj kaj montros fotojn el la fermita lando.

Harald Schicke (Germanio)

» La nova gripo «

'Porka gripo' - ĉu ĝi estas danĝera? Ni konatiĝos kun la ecoj de la nova gripo, ni informiĝos kiom danĝera ĝi estas kaj ekscios kio estas pandemio. Kion ni povas fari por protekti nin? Ĉu estas bone kaj necese vakciniĝi? Kiuj estas la riskoj de la vakcinado? Ĉu la scienca medicino agis science? Ĉu naturkuracado povus helpi? Kiu profitas, kiu malprofitas de la 'porka gripo'?

Ugo de Riu kaj Annarosa Andre (Italio)

» Ondo sur Ondon – malrapide per kajako ĉirkaŭ insuloj «

Nekutima vojaĝmaniero, krom per biciklo, azeno, ĉevalo, kamelo, piedmarŝado, ktp, eblas per kajako , la mara “biciklo”. Ni vidos kiuj estas la rimarkindaj kapabloj kaj ecoj de tiu tute simpla boateto, kiu ekzistas ekde jarmiloj ĉe multaj popoloj en diversaj formoj. Nura ilo vere esenca estas la pagajo, simila al remo kun duflanka padelo, kiu samtempe agas kiel movigilo, stirilo kaj ekvilibrilo. Senbrue, kaj tute respekte al la medio, oni povas “promeni laŭ la marbordo” je la mara flanko kaj preskaŭ senlime ... Post iom da klarigoj pri la tekniko bezonata (pro simpleco de la veturilo, temas plejparte pri korpa kaj mensa tekniko, aldone al prudento, antaŭtakso) ni vidos bildajn ekzemplerojn de nia plurjara malrapida vagado kun eta grupo de geamikoj laŭ marbordoj, riveroj kaj ĉirkaŭ insuloj de la nordflanka maro Mediteranea. La el-kajaka vidpunkto multe malsamas al la eltera, velŝipa aŭ motorboata, pleje kiam estas grotoj, maraj estaĵoj, marparkoj aŭ kaŝitaj strandetoj ...

Masumi kaj Tacuo Huĝimoto (Japanio)

» Enpaki per tuko - interrilato de objektoj kaj koro en la vivo de japanoj «

En okazo movi diversajn objektojn en la ĉutaga vivo, estas tiel, ke ni povas facile transporti, se ili estas enpakitaj per tuko. Tiurilate, la ago enpaki objektojn estas farata ĉiutage en la tuta mondo. Por la japanoj la ago “enpaki objektojn” signifas ne sole sencon fizikan, sed ĝi enhavas ankoraŭ ion alian, ekz. inter enpakanto kaj enpakaĵoj ekzistas “rita esprimo” kaj “respekta esprimo” aŭ delikata spirita aktiveco, nome kultura fono. Ĉi-foje ni prezentos, eksplike kaj demonstre, la pakadon per la paktuko, kiun la japanoj uzis tradicie kaj ankoraŭ uzas, kaj aldone tiurilatan ritan kaj respektan esprimon laŭ la vidpunkto de rimedo enpaki objektojn.

— PRELEGA ENKONDUKO —

D-ro Amri Wandel (Israelo)

» Bildoj de juda Pollando: tio kio estis kaj (ne) restis «

Okaze de la Bjalistoka UK Amri vizitis, kaj bilde dividas kun ni, la judajn heredaĵon en tri polaj urboj: Bjalistoko, Krakovo kaj Varsovio. En Bjalistoko la impresoj kaj bildoj sekvos la vivon de ĝia fama filo – Eliezer Zamenhof. En Krakovo ni promenos tra Kazimirez - la mirinde restaŭrita juda kvartalo kun siaj multaj sinagogoj, muzeoj kaj kulturo. En Varsovio ni vizitos interesajn tombojn en la juda tombejo, kiel tiuj de la Zamenhof-familio kaj Januŝ Korĉak, kaj sekvos la heroan ribelon de la juda getto.

Stano Marček (Slovakio)

» Rektmetoda instruado de Esperanto «

Ekzistas multaj metodoj por lerni lingvojn. Al la plej efikaj apartenas la t.n. rekta metodo. Kio ĝi estas? Ĉu temas pri la metodo, per kiu niaj gepatroj instruis al ni nian gepatran lingvon, kiuj sen tradukado instruis al ni rekte pensi en nia lingvo? Pri sia riĉe ilustrita lernolibro „Esperanto per rekta metodo“, kiu jam aperis en 24 lingvoj, pri didaktika materialo, kiu akompanas la librojn, kaj pri tio, kiel rektmetode gvidi Esperanto-kursojn, prelegos kaj diskutos kun vi la aŭtoro.

Stano Marček (Slovakio)

» La revuo Esperanto «

En la jaro 2005 la revuo Esperanto, la oficiala organo de UEA, kaj la plej legata esperantlingva periodaĵo, fariĝis 100-jara. Se ni konsideras paŭzojn, dum kiuj la revuo ne aperis, dum la 1-a kaj 2-a mondmilitoj, ĝi do jam aperas pli ol cent jarojn. Pri historio de la gazeto, ĝiaj redaktoroj, pri la celoj, la redakta politiko, la redaktado, enpaĝigo ktp, rakontos kaj diskutos kun vi la nuna redaktoro Stano Marček.

Paul Peeraerts (Belgio)

» MONATO – 30 jaraĝa «

Je novjaro de 1980, do precize antaŭ 30 jaroj, la unuaj numeroj de nova esperantlingva revuo estis dissenditaj: Monato, internacia magazino sendependa. En tiuj 30 jaroj Monato konis tre skuan historion: ĝin prizorgis sinsekve 3 diversaj eldonistoj, ĝi travivis 3 krizojn kaj pere-minacojn, sed ĉiam fenikse reviviĝis kaj pluservas la idealon de sia fondinto Stefan Maul: informi pri la mondo per Esperanto. Paul Peeraerts, kiu ekde la komenco kunvivis la historion de Monato, rakontos pri tiuj 30 jaroj.

Ian Fantom (Anglio)

» Iano ĉe la Piano «

La familio de Felix Mendelssohn havis interesan influon en la frua Esperanto-movado, kaj memore al tio okaze de lia ducentjariĝo Ian elektis kelkajn el liaj popularaj komponaĵoj. Li ludos ankaŭ sortimenton de muzikaĵoj el la romantika periodo, kaj eble ankaŭ kelkajn pli modernstilajn. Ĉu estos ankaŭ improvizado dependos de la momenta humoro de la piano ...

Ian Fantom (Anglio)

» Zamenhof hodiaŭ «

Kio okazus, se Zamenhof vekiĝus en la nuna epoko, kaj ĉirkaŭrigardus al la nuntempa mondo? Ja, li jam havis planojn por postmilita agado cele al pacigo de la mondo, sed li mortis tro frue. Okaze de lia 150-jara datreveno, Ian provas vidi la mondon el okuloj de la ĵus rekonsciiĝinta Ludoviko Zamenhof. La fantazio iom post iom evidentiĝas kiel fantazio, ke ni mem vekiĝu al la nuntempa mondo.

Lena Karpunina (Germanio)

» Aŭtora horo «

Aŭtora horo kun la verkistino Lena Karpunina: multfoje premiita ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA. Ŝi prezentos sin kaj pridiskutos kun la aŭskultantoj diversajn aspektojn de la Esperanto-literaturo, ekz. ĉu ni sufiĉe legas kaj kiel ni havigas al ni la librojn, kiujn ni volas legi.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

» Aŭtora horo «

Tradicie dum la aŭtora horo Mikaelo Bronŝtejn prezentos siajn freŝbakitaĵojn. Inter ili estas nur du novaj libroj, eldonitaj en 2009 en Moskvo. Temas pri la unua novelaro de Mikaelo, titolita "Lecionoj por knabo" kaj jam la kvara originala poemaro "Kajto", kie i.a. troveblas la plena versio de la poemciklo "Vojaĝo al IF". Tri aliaj libroj eldonprete kuŝas en Moskvo - ankaŭ pri tiuj la aŭtoro aludos. KomprenebleSonos dum la aŭtora horo ankaŭ kantoj de Mikaelo.

Kees Ruig (Nederlando)

» Mantro «

Mantro - budhisma formulo, tirita el sankta libro kaj ripetata dum la mensa koncentriĝo. Mantro turnas sin al nia interna memo, ĝi estas maniero por sin konekti al pli profunda ekzisto. La ripetadaj ĉantoj (formo de kantado) kaj ritmoj en mantra muziko kreas pozitivan trancon, forportantan vin de via emocia memo. Mantra muziko kreas spiritan patronon kiu unuigas la korpon kaj la animon.

Dieter Rooke (Svislando)

» Esperanta Civito «

Kial kaj kiel fondiĝis la nova E-organizo? Vi konatiĝos kun la historio de la E-movado - la klopodoj, atingoj kaj malvenkoj . Vi aŭdos pri la manifesto de Raŭmo kaj pri la unua E-civita parlamenta sesio en Le Locle (Svislando). Kun miro vi konstatos, ke povas ekzisti demokratio ankaŭ inter esperantistoj - vi ekscios pri la interna funkciado kaj iom pri la aktivuloj.

Dieter estas reprezentanto de la ruĝa frakcio kaj elektita senatano de la E-civito.

Alfred Schubert (Germanio)

» Ĵurnalismo «

Ĉu vi volas kunlabori kun redakcioj de gazetoj? Se jes, estus bone koni kelkajn bazajn regulojn. Profesia ĵurnalisto informas vin pri la plej gravaj aferoj. Alia temo estas: Kiamaniere ĵurnalistoj kontribuas al la kreado de modernaj fabeloj.

— PRELEGA ENKONDUKO —

Barbara Poterucha (Belgio)

» Kurso: Tai chi chuan - tradicia ĉina arto «

Temas pri tradicia ĉina arto por ekkoni internan energion per korpaj movadoj: larĝaj, malrapidaj, trankvilaj. La praktigado permesas reguligi spiradon, digestadon, sangan cirkuladon, kio avantaĝe influas al nerva sistemo, artikoj kaj vertebraro. Ĝi plibonigas koncentriĝon, ekvilibron, memfidon, dormadon kaj ĝojon de la vivo. Kunportu flekseblajn vestojn kaj ŝuojn sen kalkanumo! *(ĉiutage 8.00 - 8.45 h)*

Annarosa Andrei (Italio)

» Diskutrondo pri ... Ĝemelaj Urboj kaj Esperanto «

En mia urbo (Carrara) okazas granda "bierfesto" kun germana ĝemela urbo (Ingolstadt), en kiu pasas kaj manĝas 140.000 homoj, sed nenia komunikado okazas inter la italoj kaj la germanoj, ĉar germanoj parolas germane kaj italoj la italan ... La 'nura interŝanĝo' estas: Carrara-anoj manĝas germane kaj trinkas bavaran bieron en Carrara dum la "bierfesto", kaj Ingolstadt-anoj manĝas itale kaj trinkas italan vinon en Ingolstadt dum la "vinfesto". Ĉu eblus plivastigi la rilatojn inter la du? Kian rolon povus havi Esperanto? Mi tre ŝatus koni aliajn spertojn, tial ke oni povu proponi ion pli "kulturan" (pli bone se per Esperanto) al nia urbestraro. Pro tio mi invitas ĉiujn, kiuj havas spertojn aŭ ideojn tiurilate.

Stano Marček (Slovakio)

» Sonlibroj de Raymond Schwartz«

Raymond Schwartz (1894 -1973) estis franca bankoficisto kaj Esperanto-verkisto. Liaj skeĉoj kaj liaj libroj estas tre amuzaj kaj spritaj, sed ne ĉiam tre prudaj... En Parizo Schwartz gvidis la kabaredojn Verda Kato (1920 - 1926), Bolanta kaldrono (1936 - 1939) kaj Tri koboldoj (1949 - 1956). Li redaktis la ĵurnalon La Pirato kaj kontribuis per humuraĵoj inter alie al la Sennacieca Revuo. Stano prezentos la verkojn de Schwartz, sed speciale serion de kompaktaj diskoj kun voĉlegitaj (deklamitaj) verkoj La Stranga Butiko kaj Verdkata Testamento.

Alfred Schubert kaj d-ro Eugen Macko (Germanio)

» Ĉu Esperanto-partioj? «

I: Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) progresas. En 2009 ĝi partoprenis en du landoj (Francio kaj Germanio) en la balotoj por la Eŭropa parlamento. Ĝi ricevis 42 000 voĉojn. La nova partio, kiu celas enkonduki Esperanton kiel komunikilon en Eŭropa Unio havas novajn celojn, interalie ĝi planas petskribon por demokratiigi eŭropajn balotojn. Se vi interesiĝas pri politiko, informiĝu kaj kundiskutu.
II: La dua prelego temas pri UNU MONDO, kiu fondiĝis kiel nova partio antaŭ nelonge en Wiesbaden, ĝi celas utiligi Esperanton kiel tutmondan lingvon kaj volas partopreni balotojn en ĉiuj niveloj..

Stano Marček (Slovakio)

» Ĉu instrui kantojn en niaj Esperanto-kursoj? «

Lernantoj en niaj E-kursoj ofte laciĝas post kelkhora laboro. Tamen, se vi fine de la lecionoj prenas gitaron aŭ eksidas apud piano kaj instruas al ili belan Esperanto-kanton, ili vigliĝas kaj lernas plu, per amuza kaj gaja maniero parkerigante tekstojn de la kantoj. Nia gasto Stano Marček instruos al vi kelkajn Esperanto-kantojn konvenajn por niaj kursoj kaj montros al vi kiel gvidi la instruadon.

3-a Internacia Vintra Universitato
- agnoskita kiel AIS-sesio -

IVU: 3-a Internacia Vintra Universitato en IF

*Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu festis en Bjalistoko sian 62-an datrevenon, **ĝ**is la jaro 1980 nomi**ĝ**is Internacia SOMERA Universitato (ISU). Kial ne estu ankaŭ VINTRA universitato? Oni **ŝ**an**ĝ**is la nomon ISU al IKU dum la UK en Brazilo, kiu okazis en la vintro de la suda hemisfero. En la UK en Tampereo, 1995, ni organizis la unuan komunan sesion de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj IKU. En 2007 unuafoje okazis IVU - la vintra ekvivalento de IKU, kiu samtempe estas studadsesio de AIS (fakte AIS-sesio okazis dum IF jam kvarfoje en la pasinteco).*
*La **ĉ**i-jara elekto de temoj estas denove varia. La prelegoj estas en la formo de kvar AIS-kursoj, kiuj konsistas el po du prelegoj (krom tiu de d-ro Eugen Macko). Fine estas la ebleco ekzameni**ĝ**i kaj akiri AIS-atestojn.*
Amri Wandel (rektoro)

Prof. d-ro Amri Wandel (Israelo)

» Fabeloj de sezonoj kaj astroj «

Astronomio estas la plej antikva scienco. Ĝia komenco ligiĝas al la neceso registri la gravajn datojn por agrikulturo - kiam semi, kiam falĉi kaj rikolti. La antikvuloj kreis kalendarojn, kiuj rilatigis la astrojn al la sezonoj. Paralele evoluis mitologioj kiuj ligis la sunon, lunon kaj la stelojn al dioj kaj al religiaj ritoj. La babilonianoj, la egiptoj, la grekoj kaj la romianoj, kiel pli poste la araboj, kaj en Ameriko kaj la inkaoj kaj majaoj - havis diversajn historiojn pri la kreado de la universo, evoluigis astronomiajn konojn kaj la mitologiojn kiuj ligiĝis al la astroj kaj la konstelacioj. En la unua prelego ni lernos pri diversaj kalendaroj - la suna (gregoriana) kaj la luna (juda kaj islama), kaj mitologioj (ĉefe la greka/romia) kaj iliaj spuroj en la ĉielo - la nomoj de la astroj, la fabeloj de la konstelacioj. Ni aparte enfokusigos la mitojn pri la ruĝa planedo - Marso - kiu en januaro 2010 atingos sian plej proksiman pozicion al la Tero kaj observos ĝin per teleskopo. Fine ni aŭdos la modernan fabelon - kiel evoluis la astronomia kono en la nova epoko, kaj kiel dum kvar jarcentoj la astronomoj iom post iom malkovris la veran historion de la astroj kaj la universo - kiu estas pli fantasta ol ajna mitologia fabelo. *(2 x 90 min.)*

Amri estas profesoro pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo. Specialisto pri aktivaj galaksioj, nigraj truoj kaj astrobiologio. Gast-profesoro en la universitato (UCLA) de Los Anĝeleso, Usono. *Sekretario de IKU de UEA.*

Hannes Larsson (Francio)

I: » Distraj matematikoj – antikvaj fabeloj «



Ambaŭ prelegoj de Hannes havas la ĝeneralan temon »distraj matematikoj«. La unua prelego entenas kelkajn antikvajn fabelojn. La legendo pri Diogeno kaj la turistoj enkondukas facile en la logikon. La Kreta paradokso estas kaprompilo, dum la paradokso de la kurkonkurso inter Akilo kaj la testudo estis dilemo por la helenaj filozofoj, sed ne por ni. Ni scias kalkuli astronomiajn kvantojn, kiujn oni renkontas en la legendo de la reĝo kaj la ŝaktabulo. Ankaŭ la rakonto de la nedividebla heredaĵo ridigas nin. Kiel partigi torton juste? Pri tio Hannes donos interesan hejman ekzemplon. Strangaj nombroj π kaj la ora nombro ne estos misteraj por ni. La nombroj de Fibonacci: elementaj, karaj amikoj, post la klarigoj de Hannes. Fine, ni parolu iom pri probabloj. *(1x 90 min.)*

Hannes, finndevena franco, komencis sian inĝenieran karieron en Tampereo, poste eklaboris en Francio, eniris aerospacan industrion, estris laborgrupon ĉe la EU-esplorcentro en Ispra (Italio) kaj fine havis administran postenon ĉe la Eŭropa Komisiono en Bruselo. Nuntempe li estas emerito en Francio.

Hannes Larssoni (Francio)

II: » Distraj matematikoj – rakontoj kaj anekdotoj «

Tiu ĉi prelego entenas tri partojn. La unua estas la rakonto de la debato inter la franca filozofo Diderot kaj la fama matematikisto Euler. Ĝi okazis en la cara kortego de Sankt-Peterburgo en 1774. Ni eĉ improvizos teatraĵon, en kiu la ĉefroluloj estas Katerino la Granda, princo Grigorij Potjomkin kaj kompreneble Diderot kaj Euler. Poste Hannes prezentos kolekton de spritaĵoj de la humuristo Mark Twain. Lia rakonto de la malaperonta longo de Misisipo mokas la emon de la politikistoj al »optimisma eksterpolado«. En la tria parto la aŭtoro prezentos la lastan teoremon de Fermat. Ĝia pruvo havas longan historion, kies paĝoj estas makulitaj de sango.

(1x 90 min.)

Yashovardhan Singh (Germanio/Hindio)

» De cifero al nombro – historio de la NULO «

Dum la homa historio ekestis diversspecaj ciferaj sistemoj por reprezenti nombrojn. Kelkaj el ili estis “adiciaj”, aliaj “poziciaj”. Poziciaj sistemoj bezonas ciferon “nulo”. Nur multe pli post la enkonduko de la nulo oni konstatis ke ĝi ne estas nura cifero sed eĉ memstara nombro. Pere de tiu historio de la “nulo” la preleganto klopodos doni superrigardon pri la diverssistemaj ciferoj uzitaj ekde la ekesto de skribo kaj ankaŭ pri la ekesto de algebro. - La kunsido okazos pli kiel ekzerco ol prelego. La partoprenontoj estos petataj pere de disdonotaj folioj kunlabori. Ateston oni ricevos pro tuttempa kunlaboro kaj ne nur pro sukcesa aŭ malsukcesa ekzameniĝo. (*2 x 90 min.)*

Jaŝo naskiĝis en Hindio kaj loĝas ekde 1972 en Germanio. Li diplomiĝis pri matematiko kaj magistriĝis pri lingvistiko. Li kunverkis plurlingvan matematikan vortaron.

Dipl. inĝ. d-ro Eugen Macko (Germanio)

» Ekologio de kulturoj kaj la hipernacia lingvo «

Por ricevi trarigardon en la ŝajne kaosa mondo la pensanta homo serĉas iun sistemon kaj hierarkion en la observataj fenomenoj. La grekdevene eŭropeca pensmaniero longe fieris pri sia ekskluziva racieco trovi la plejmultan regulecon kaj fiksi tiun al leĝoj. Daŭris en la historio de la pensado, ĝis la ekkono, ke la fiksaĝoj povas ankaŭ ĝeni kaj bremsi la pluevoluon. En nia estanteco, kelkaj novsperteblaj rilatoj, montras al la relativeco de fiksiga pensmaniero, post kiu ŝanĝiĝis la juĝo pri la metodo de oldaj, hierarkie sistemaj reguloj, en sciencaj esploroj (jam longe antaŭe, ol tiu tendenco estis konscia, okazis en diversaj artoj la deiĝo de la klasicismo). Unu de tiuj lastaj ekkonoj, estas la relativeco de la lingva hierarkio. La klasika lingva scienco estis okupita kun la pruvo, montri el la propra profundeco la eksterordinarecon de la respektiva nacia lingvo kaj per tiu fundigi ankaŭ la pretendon al socia regado. Ke mankas objektivaj kriterioj hierarkie distingi inter la lingvoj, montriĝis pere de novevoluintaj sciencoj de psikologio, socipsikologio, socilingvistiko, ekologio kaj politologio de demokratio. Ili montris la limojn de klasikaj sistemoj kaj ebligis elpaŝon al pluevoluo. Aperis kelkaj gravaj esploroj en la nomitaj sciencaj branĉoj kiuj ebligis reale pli adekvatajn ekkonojn ankaŭ en la lingvistiko. Unu el tiuj estas la socilingvistika verko de Abram De Swaan pri la „socio de lingvoj“ (Words of the World). Tiu elstara esplor-laboro havis por laŭtempe ĝusta kompreno de la klasika lingvistiko decidan influon. Ĝian signifon en la lingvistiko mi volus eĉ kompari kun la graveco de Hegel en la idealisma filozofio. Kiel Hegel tiam en la filozofio atingis la pinton de la eŭropa idealismo, nun per tiu soci-lingvistika laboro eblas ekkoni la pinton de la idealisme klasika lingvistiko. Post tiu ekkono estiĝis ĉiu konkuro de naciaj lingvoj vana, ĉar la pinto nun jam estis atingita. Tamen la lingva problemo restis ne solvita, ĉar mankas la morala kvalito de la tutmonda demokratio al kiu ankoraŭ necesas politike pluevolui. (1 x 90 min.)

Eugen studis konstruteknikon en la universitato de Beogrado, poste filozofion, internacian politikon kaj socipsikologion en la universitato de Munkeno.

Niaj du apudaj fotoj
rilatas al la prelegoj de
d-ro Amri Wandel
kaj Hannes Larsson (II)
(vd. paĝojn 19 kaj 20):
maldekstre:
la planedo Marso
(laŭ Hubble-teleskopo)
dekstre:
la fama matematikisto Euler